

KRESKO 4

2018 marto

KROATA ESPERANTISTA KOLEGARO

Per malgranda kontribuo – al granda konstruo!

En la unua numero de *Kresko* ni anoncis la kampanjon *Por deca hejmo de DEC*, kiu rezultigis dilemojn ĉe kelkaj samideanoj.

Tuj post la lanĉo de BRIKO-kuponoj, telefonis al ni sinjorino, kiu diris: „**Mi tre ŝatas vian ideon, sed mi estas pensiulino kaj mia emeritaĵo ne permesas al mi kontribui per granda sumo. Mi ne scias, ĉu vin ofendos mia propono investi nur dek eŭrojn?**”

Ĉe tiaj demandoj ni rememoru pri la devizo de Tibor Sekelj: **Pli bona praktiko, ol centhora prediko!** Alivorte dirite: vanas skribi kaj paroli, ke ion oni devus solvi, ke io estas nepre farenda aŭ bezonata, se ni nur deflanke rigardas la aferon kaj opinias, ke iu alia plenumos tiun taskon. **Pli valoras malgranda, sed certa kontribuo, ol multaj promesoj kaj ŝultrofrapado!**

Ĉia konstruado komenciĝas per la unua briko kaj la unua trulo da mortero!

Dokumenta Esperanto-Centro, la nacia Esperanto-arkivo en Kroatio ekestis sammaniere: komence oni aĉetis unu libron kaj kolektis kelkajn gazetojn kaj dokumentojn! Nur poste venis multaj kaj amasaj kontribuoj! Kaj tiu laboro daŭras obstine kvardek jarojn!

Estas facile diri, ke la kolektado kaj konstruado estas privata afero, kaj ilin plenumu tiu, kiu deziras aŭ havas ian utilon el tia laboro. Se antaŭ kvardek jaroj la iniciatinto estus pensinta pri utilo, li certe farus nenion por fondi la arkivon. Sen lia ĝustatempa agado, multaj malnovaj kolektoj de forpasintaj samideanoj jam delonge estus perditaj, sekve: nun ni ne havus la dokumentojn ekz. de

Esperanto-societo el Vinkovci, kiuj estis transprenitaj lastminute antaŭ forpaso de profesorino



Nada Med. Certe malaperus la kolekto de Tomo Gregurek el Koprivnica, kiu post lia morto kuŝis en fojnejo, aŭ tiu de Esperanto-societo en Bregi, kiu travivis la Duan mondmiliton enterigita en stalo, kaj savis ĝin kaj gardis Franjo Petriĉević, kiu transdonis ĝin al tiam ankoraŭ neekzistinta DEC. Kaj tiaj ekzemploj estas multegaj!

Se ni atendas, ke ĉiu el ni povu donaci al Dokumenta Esperanto-Centro por konstruaj celoj milojn da eŭroj, kiel tion faris la aŭstralia samideano, la finkonstruo aŭ okazos neniam, aŭ kun granda prokrasto. Sed oni ne havas tempon por atendi, ĉar jam nun mankas spaco por tiel granda kolekto.

Dume rapide pasas la tempo kaj baldaŭ venos la sezono por konstruado. Intertempe multaj el vi jam uzas la servojn de DEC, petante esplori ion, mendante fotokopiojn aŭ skanaĵojn, serĉante duoblajn gazet-numerojn aŭ historian foton. DEC ricevas pli ol 200 similajn petojn dum ĉiu jaro, kaj plenumas ilin, ofte senkoste! Tiam la fero jam ne estas privata, sed utila servo al la movado!

Laste mi legis interesan opinion de Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, aperintan en *Esperanto-revuo* (vidu la citaĵon sur la paĝo 3), kiu venas ĝuste en la jaro, proklamita Jaro de Esperanto-kulturo!

Se ni ĉiuj agus kiel la sinjorino el la komenco de nia rakonto, kiu proponis **dek eŭrojn**, ni havus la ĉenefikon! Ĉiu kontribuinto stimulus la aliajn al agado, kaj fine **per malgrandaj kontribuoj plenumiĝus la granda konstruo!** Ĉiu kontribuinto sentus la samon: apartenon al la komuna projekto, kion ja celas la komuna agad-platforno KRESKO! Nur tiel la aferoj kreskas kaj evoluas.

Kaj se vi, karaj legantoj, nur per investo de **dek eŭroj** kontribuas al aĉeto de 10 brikoj, ĉar pli multe kontribui nun vi ne povas, vi havas la ŝancon ripeti la samon eĉ kelkfoje, kaj tamen atingi la saman efikon, kvazaŭ vi estus aĉetinta tuj cent aŭ mil kuponojn.

Kaj ne malgrave: komprenu, ke la BRIKO-kuponoj povas esti via donaco al DEC, sed ankaŭ investo. Kontraŭ ili vi povos aĉeti eldonaĵojn aŭ pagi servojn de DEC, kiu jam nun multon ofertas al vi. Kiam ĝi havos sian decan sidejon, DEC estos eĉ pli utila al la tuta movado. Konklude, **ni ŝparu la vortojn, sed efektivigu la agojn!**

Josip Pleadin



Jubilea eldono de Julio Baghy

Pasintjare, okaze de la 130-jara datreveno de Esperanto, aperis la unua libro el la serio *Jubilea eldono* de la verkaro de Julio Baghy, pri kies 50-a mortodatreveno ni rememoris samjare. Tiun libron sekvas aliaj verkoj de la sama serio, kaj la fina celo estas reeldoni la tutan 16-voluman verkaron de nia plej eminenta verkisto en bele presitaj libroj.

Se iu serioza libroŝatanto kaj leganto en la Esperanta libromarkato serĉus klasikajn verkojn de nia originala literaturo, li devus konstati, ke ili aŭ plene mankas, aŭ aĉeteblas tre malnovaj eldonoj. Ofte oni devas kontentiĝi pri brokantaj ekzempleroj aŭ fotokopioj, serĉante ankaŭ retajn eldonojn, sed ĉio vanas. La verkoj de multaj niaj klasikaj verkistoj, eĉ de la plej gravaj, mankas en niaj libroservoj, ĉar simple – neniu reeldonis ilin.

Tiun mankon jam de longe konstatis homoj, kiuj pri literaturo kaj librovendado ĉiutage okupiĝas. Unu el ili estas **Tomasz Chmielik**, lekciisto en la Interlingvistikaj studoj de la Universitato **Adam Mickiewicz** en Poznano. Kaj ne malpli suferas **Ionel Oneț**, la gvidanto de nia ĉefa libroservo – tiu de UEA – kiu devas ofte, kun bedaŭro, respondi al potencialaj klientoj, ke iu titolo ne plu aĉeteblas.

Feliĉe, Tomasz Chmielik dediĉis sian tutan vivon al nia literaturo, editorado kaj libroeldonado, kaj kunlabore kun aliaj ŝatantoj de presitaj libroj,



jam de jaroj li organizas mirindan eldonan aktivecon. El tio tute nature sekvis reeldonado de mankantaj perloj de nia literaturo, kio estas kronita per la grandega projekto, kun la celo reeldoni ĉiujn verkojn de unu el niaj plej eminentaj originalaj verkistoj

– **Julio Baghy**. La definitiva starto de la projekto okazis en 2017, la jaro en kiu ni iasence resumis la rezultojn de la 130-jara ekzisto de Esperanto. En tiu jaro, koincide, oni omaĝis ankaŭ la 50-jaran mortodatrevenon de Julio Baghy. Sekve, la speciala serio de liaj reeldonataj verkoj, ricevis la nomon *Jubilea eldono*. Ĉirkaŭ tiuj projekto kolektiĝis kvar eldonistoj, el kiuj *Libro-Mondo* (Ŝvidnik), *Ars Libri* (Lublin) kaj *Bjalistoka Esperanto-Societo* estas el Pollando, kaj *Dokumenta Esperanto-Centro* (Ĝurdevac) el Kroatio. La laboro estas sufiĉe bone dividita, do la eldonritmo dependos nur de la disponebla mono por kovri la preskostojn.

La librojn editoras kaj provlegas **Tomasz Chmielik**, tipografie prilaboras kaj enpaĝigas **Josip Pleadin**, la kovrilojn projektas **Przemysław Wierzbowski**, kaj la serion redaktas **Tomasz Chmielik** kaj **Luiz Fernando Dias Pita** el Brazilo.

La libroj estas kompostataj en Kroatio kaj presataj en Pollando.

Kiel ni jam diris, la unua volumo, respektive *Printempo*

en la aŭtuno jam aperis meze de 2017. Kompostitaj kaj prespretaj aŭ jam presataj estas tri novaj volumoj: *Sonĝe sub pomarbo*, *La vagabondo kantas kaj Migranta plumo*. Aktuale estas kompostataj kvin aliaj volumoj: *Ĉielarko*, *Teatra korbo*, *Dancu marionetoj*, *La verda koro kaj Hura!*. Dum 2018 oni planas prespretigi ankaŭ la jenajn verkojn: *Verdaj Donkiĥotoj*, *Aŭtuna foliaro*, *Preter la vivo*, *Viktimoj*, kaj *Pilgrimo*.

Samtempe kun tiu granda projekto, okazas planado kaj eldondo de unuopaj volumoj de aliaj verkistoj. Kiel konate, en 2017 estis reeldonita la populara legolibreto *Karlo de Edmond Privat* kaj *Ivan la Sesa* de **Geraldo Mattos**. Jam kompostitaj kaj prespretaj estas la romano de **Teo Jung Landoj** *de l' fantazio* kaj *El la notlibro de*

praktika esperantisto de **K. R. C. Sturmer**.

La vico de eldonitaj aŭ eldonotaj klasikaĵoj ne finiĝas per tio. Ĝi kompletigas per famaj tradukitaj verkoj. Post la jam eldonitaj *Sinjoro Tadeo*, tradukita de **Antoni Grabowski** kaj *Quo vadis*, tradukita de **Lidja Zamenhof**, baldaŭ sekvos *Tra dezerto kaj praarbaro*, tradukita de **Mieczysław Sygnarski**, kiu jam prespreta.

Aldoniĝas al tio multaj nove tradukitaj verkoj el diversaj literaturoj, sed tio eble estu la temo de iu alia artikolo kaj signalo de la revigliĝo de nia merkato.

Ĉi momente ni alkröcunian atenton nur al Julio Baghy. Eble ne estus malsaĝe jam nun mendi aŭ antaŭmendi la tutan serion (aŭ, se vi preferas, nur unuopajn volumojn). Tio

unuflanke helpas al vi akurate ricevadi nove eldonitajn volumojn kaj havi laŭeble la kompletan serion, kaj aliflanke helpas al la eldonistoj kalkuli la bezonatan eldonkvanton. Komprenu, ke eldonado de libroj estas longdaŭra kaj multekosta afero, do prefere ĝi estu farata sinergie de la eldonistoj, librovendistoj kaj legantoj. Tiam ĝi estos plej efika kaj por la tuta movado plej utila.

Dokumenta Esperanto-Centro volonte akceptos viajn ataŭmendojn, sed ankaŭ aliaj movadaj libroservoj estos stimolitaj havi tiujn librojn en sia asortimento, se vi jam nun demandas pri ili.

Ne atedu, ke iu alia per granda fortostreĉo kaj risko faru tion, kion vi mem povas fari komforte el via hejmo kaj per minimuma investo! Antaŭmendu!

Antaŭmendojn akceptas: dec.kroatio@gmail.com

Kroato, kiu konkeris Antarkton

La kroata vojaĝraportisto, esploristo kaj fotisto **Davor Rostuhar** (naskiĝinta en 1982) fariĝis la unua kroato, kiu el la bordo de Antarkto piede venis al la Suda poluso, kiun li atingis la 17-an de januaro 2018 post la aventuro, kiu daŭris 47 tagojn. Dum tiuj tagoj li moviĝis sur skioj kaj averaĝe trapasis 30 kilometrojn tage en ekstrema malvarmo de -40 gradoj. Dum la tuta vojaĝo li posttiris la pezan sledon kun la necesaj ekipaĵoj kaj manĝaĵoprovizio. La vojaĝo konsistis el 1200 kilometroj. Li estas la sola kroato inter nur 24 homoj, kiuj sukcesis fari la samon.



Davor Rostuhar kun la kroata flago ĉe la Suda poluso

CITAĴO: Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

Esperantistoj devas pli aktive agi por konservi la kulturan heredaĵon de Esperanto, kies eroj kreiĝis dum la lastaj pli ol 130 jaroj. Unu el la celoj de tia agado devas esti zorgo pri la estonto de E-bibliotekoj kaj arĥivoj – kaj fizikaj kaj virtualaj.

Citaĵo el: *Ni helpu al la Esperanto-kulturo en la Jaro de Esperanto-kulturo* (en: *Esperanto-Revuo*, n-ro 1322, marto 2018, paĝo 51)

* * *

Maizkampar' de Kroatio
konsternas.
Malhelverdaĵo de ĉi tio
sin sternas
senlime, senmezure, vaste,
ĝishorizonte.
Ho ve, la buso kuras haste,
kaj la bezon' de
restad' en la maiza maro
ne evidentas,
sed arda spir' de la kamparo
ja tiom tentas,
ke penas mi en mia eno
la bildon fiksi,
kaj, certa pri neniamveno,
l' impreson miksi
en la kaldrono de l' memoro
kun la aliaj,
ĉar savas min en mava horo
impresoj miaj.

aŭg. 2017

Bjelovaraj poemoj

* * *

Mi, certe, miras, ĉar
jen bildo por atento:
sur strat' de Bjelovar
antenoj kontraŭ templo.

La loka Telekom
en stilo tute nova
najbare servas kun
servej' por Ĉiopova.

Do, promenante laŭ
etero ekster limoj
ricevas predon la
ĉasantoj pri animoj.

Elektas homo mem
sen difinita leĝo
la solvon por problem':
televidil' aŭ preĝo.

Kaj pure peka pens'
en mia kapon falas:
Du ejoj por la mens' –
ĉu ili jam egalas?

aŭg. 2017

Por Josip P.

Apenaŭ havas ŝancon la esper',
ke l' tuta mondo fine nin komprenos.
Apenaŭ en feroĉa atmosfer'
al ni adeptoj pacaj are venos.

Apenaŭ vera am' al poezi'
la sekiĝintajn korojn veke tuŝos.
Apenaŭ iam vidos vi kaj mi,
ke la kruelo ne plu ĉion fuŝos.

Kaj ununura restas la motiv'
por vortojn la sincerajn plekti rime:
Amikoj ĉeas nun en nia viv',
kaj ili nin komprenas. Peranime.

aŭg. 2017



Mikaelo Bronŝtejn

Rememoroj pri mia infanaĝo

Ĉi tiun rakonton mi komencos ekde mia infanaĝo, kiu estis tre feliĉa tempo post la Dua mondmilito, pasigita en la plej bela regiono de mia kara patrolando Kroatio. Mi naskiĝis en Lepoglava en la regiono de la Kroata Postmontaro (*Hrvatsko Zagorje*) en la jaro 1945.

Tiu vivoparto restis en mia memoro kiel la plej feliĉa periodo, ĉar tiutempe oni vivis tre simple kaj modeste. Ekzistis nek tro grandaj riĉuloj, nek tro malriĉaj homoj. La modesta vivo respuguliĝis en la estimo de aliuloj kaj en la reciproka helpado. Ĉiuj vilaĝanaj familioj posedis proprajn plugkampojn, arbarojn, brutaron kaj kortojn. Ne mankis nutraĵoj dum la tuta jaro. En ĉiu familio nur unu aŭ du personoj laboris en nemultaj entreprenoj, kiaj estis ŝton-minejo, brikejo, manufakturo kaj meblo-fabrika.

La vetero ĉiam estis belega. La jarsezonoj ŝanĝiĝis unu post la alia, preskaŭ ĉiam egalritme, kun maloftaj osciladoj, kiuj estis nek longdaŭraj, nek tre fortaj. Tre bone mi memoras la jaron 1957, en kiu la 1-an de majo neĝis. Tio okazis nur unufoje, kiam la arboj jam havis foliojn. Okazis grandaj damaĝoj, ĉar multaj branĉoj rompiĝis, peziĝintaj pro la neĝo. Tamen, la malbona vetero daŭris nur unu tagon, post kio la neĝo degelis, la temperaturo plialtiĝis, kaj la vivo en la vilaĝo tute normaliĝis. Al ni, infanoj, la vintroj prezentis grandan ĝojon. Dum la vintraj ferioj ni ĉiam povis plezure skiadi kaj glitveturadi. La vintroj estis tre longaj kaj tre malvarmaj, kun multe da neĝo. La neĝo knaris sub la plandoj dum paŝado. Kiel belegaj estis tiuj vintraj tagoj! Dum

tiaj tagoj ne estis multe da laboro, kaj ni povis kviete atendi alvenon de printempo. Okazadis gajaj karnavaloj, la vilaĝanoj amikumis kaj organizis dancvesperojn. Ne ekzistis televidiloj kaj aŭtomobiloj, sed nur bicikloj, kiuj estis tre rara kaj valora posedaĵo.

Kun alproksimiĝo de printempo ni estis jam lacaj pro nenifrado, malvarmego kaj neĝoplena vintro. En niaj kortoj restis amaso da neĝo, kiun ni devis forigi per ŝoveliloj kaj ĉaretoj, transportante ĝin en la riveron,



kiu fluis tuj apud nia domo. Kiam nia korto restis senneĝa, ĝi estis preta por kreskado de herboj, bonvenigataj de la sunradioj, kiuj estis multaj, sed sufiĉe fortaj. Tiaj vintroj daŭris dum preskaŭ 25 jaroj post la Dua mondmilito.

La klimataj ŝanĝiĝoj statistike komenciĝis en la 1950-aj jaroj, sed komence ili estis ne tre rimarkeblaj kaj fortaj. Dum mia junaĝo ekzistis malmultaj aŭtomobiloj, aviadiloj, fabrikoj kaj aliaj poluantoj de la naturo. Ne ekzistis problemoj pri la rubaĵoj, kaj ni vivis harmonie kun la naturo.

La infanaĝa tempo por mi aparte belis dum printempa sezono, precipe en aprilo kaj majo, kiam komencis disvastiĝi ĉarmaj

odoroj de floroj, fruktarboj kaj plantoj. Speciale interesaj estis urtikoj, kiuj apud nia domo abunde kreskis.

Ĉirkaŭ la 1-a de majo okazis plugado de niaj kampoj. Ne ekzistis traktoroj, sed en la regiono de la Kroata Postmontaro homoj posedis ĉevalojn kaj la necesan plug-ilaron. Sur la kampojn oni ĵetadis nur stalan sterkon, kaj la nutraĵo estis produktata sen mineralaj sterkoj, kiuj nuntempe uzatas amasege, kaj kiuj malpurigas niajn kampojn kaj subterajn akvofluojn.

Ni plantis terpomojn, maizon, fazeolon, tritikon kaj ĉion alian, necesan por nia konsumado.

La precipitaĵoj estis regulaj, kaj kreskado de plantoj estis stimulata per mildaj kaj varmaj sunradioj. Oni ne bezonis apartan protekton por la plantoj, ĉar ne ekzistis plantomalsanoj. Ĉio kreskis senĝene, kaj niajn taskojn ni plenumadis nur manlabore.

Someroj estis varmaj, sed multe pli agrablaj, kompare kun la nunaj. Falĉadon de herboj por nutrado de la brutaro ni efektiviĝis per manfalĉiloj. Tio estis malfacila laboro, farata dum sunaj tagoj. La infanoj tiusezone havis feriojn kaj nudpiede promenadis, ĝuante la ludadon. Sed ankaŭ la infanoj helpadis siajn gepatrojn en preskaŭ ĉiuj laboroj. Sinbanado en la rivero Bednja estis ofta amuzaĵo dum tiuj someraj tagoj. Ni ankaŭ ofte grimpis sur la monton Ivanščica, en kies arbaroj ni kolektadis brullignon. Temis pri sekaj branĉoj por niaj fornoj, sur kiuj ni kuiris ĉiutagajn manĝaĵojn. En la arbaroj apud nia domo kreskis tre bongustaj mirteloj, kiujn ni ofte kolektadis kaj manĝis. Post

la fino de somero venis aŭtuno. Tiam rekomenciĝis lecionoj en la lernejo, sed la helpado al niaj gepatroj ne ĉesis, ĉar venis la tempo por rikolti ĉion antaŭ veno de la vintro. La vinberrikoltado estis tre grava, ĉar ni ĉiuj posedis vinberejojn. Rikoltado de fungoj tiutempe estis tre kutima, ĉar pro la regulaj precipitaĵoj la kondiĉoj por ilia kreskado estis tre taŭgaj. En la arbaroj sur Ivanŝĉica kreskis multaj kaŝtanoj, kaj ni kolektadis iliajn fruktojn. La kaŝtanoj oni kuiradis kaj bakadis, kaj ĝuis ilian guston. Manĝante la kaŝtanojn ni ankaŭ trinkis nian bongustan vinon, produktitan el la aŭtoktonaj vinber-specioj. Temis pri specioj, kiujn oni ne devis protekti per ŝprucigo de diversaj kemiaĵoj.

En Lepoglava mi vivis proksimume 20 jarojn, kiujn mi konservis en neforviŝebla

memoro. Kvindek jarojn poste mi kaj miaj fratoj revizitis nian vilaĝon. Ni tre surpriziĝis pro la multegaj ŝanĝoj. Preskaŭ ĉio estas asfaltita kaj multas novkonstruitaj domoj. Ekzista kanalizacio. Tute nekredeble! Ni revizitis la arbarojn, en kiuj ni iam ludis kaj kolektadis sekajn branĉojn. Nun ĉiuflanke kuŝas tiaj branĉoj, kiujn neniun plu kolektas, ĉar en la domoj por hejtado oni uzas tergason. Ĉio aspektas kiel en urboj, kvankam Lepoglava estas vilaĝo, en kiu vivas malpli da loĝantoj ol antaŭ 60 jaroj. La akvo-nivelo en la rivereto, kiu troviĝis apud nia domo, nun estas tre malalta. Proksime estis la domo de miaj geonkloj, kiuj posedis akvomuelejon, en kiu oni muelis grenon por la vilaĝanoj. La muelejo ne plu funkcias pro akvomanko. En la naskiĝvilaĝo de mia patrino antaŭe ĉiu familio posedis almenaŭ unu bovinon.

Hodiaŭ la bovinojn neniun posedas! Sed ĉiuj havas aŭtomobilojn, kiuj malpurigas la naturon. Kvankam el Lepoglava al Varaždin, la administra centro de la regiono, oni povas veturi trajne kaj buse, malmultaj uzas tiujn trafikilojn. Ĉu la trajno al Varaždin estas profitiga entute? Mia frato diris, ke li posedas aŭtomobilon, por ke ĝi servu al li, kaj kiam mi admonis lin pri la poluado de la naturo, kiun plejparte faras la aŭtomobiloj, li moke diris al mi: „Ĉu vi savos la mondon?”.

Ĉi tiun rakonton mi finas per la novaĵo, ke la nuna prezidento de Usono ne plu agnoskas la Parizan interkonsenton pri la klimataj ŝanĝoj. Kien do iras la mondo? Ĉu ankoraŭ restas la tempo por ŝanĝi nian konduton al la naturo?

Marijan Benc

*Ili jam subtenis
la kampanjon!
Ĉu vi sekvos
ilian ekzemplon?*

Kampanjo Por deca hejmo de DEC (Listo de briko-aĉetintoj)

1. Dragutin Smolić (Paderborn)	5 brikoj
2. Anonima	10 brikoj
2. Marija Jerković (Zagrebo)	20 brikoj
3. Anto Mlinar (Zagrebo)	10 brikoj
4. Roža Brletić-Višnjić (Zagrebo)	10 brikoj
5. Teodor Mikić (Dugo Selo)	2 brikoj
En februaro 2018:	57 brikoj

Por deca hejmo de DEC!

**AĈETU VIAN BRIKON
KAJ KONSTRUU KUN NI!**

**Bankkonto de UZE:
Udruga zagrebačkih esperantista
HR7923400091110321529, BIC/SWIFT-kodo: PBZGHR2X**



aŭ: *uzes-y* ĉe **Universala Esperanto-Asocio**

Ĉu kameloj en Kroatio? Kial ne?

Kiam antaŭ tri jaroj la tiama urbestro de Ĝurđevac, **Željko Lacković** anoncis, ke la estraro de tiu malgranda nordkroata urbo aĉetos kamelojn, ĉiuj opiniis, ke temas pri ŝerco. Kvankam tiu ideo unuavide ŝajnis absolute senseca, montriĝis, ke la urbestro estis tute serioza.

Sufiĉas ekscii, ke apud Ĝurđevac iam troviĝis vasta sabla dezerto, kaj la stranga decido de la urbestro fariĝos pli komprenebla. Granda areo kun moviĝantaj sablaj dunoj etendiĝis inter la vilaĝoj Molve kaj Kalinovac, kaj ne senkaŭze tiun sablan regionon oni nomis *Kroata Saharo*. La moviĝanta sablo dum ventaj ŝtormoj superŝutadis la domojn kaj kreskaĵojn, kaj la regiono estis tre malfacila por loĝado.

Kiel ofte okazas, la naturajn malfacilaĵojn homoj kutime venkas per bonaj ideoj kaj multe da laboro. Per organizita plantado de diversaj kreskaĵoj ekde 1891, komence de herboj kaj poste de arboj, la loĝantoj de ĉi tiu regiono en daŭro de nur unu jarcento tute ŝanĝis ĝian aspekton kaj la vivkondiĉojn. La iaman flavan sablan regionon anstataŭis la




verdaĵo de herbejoj kaj arbaroj. Ĉar la homan laboron ankaŭ la naturo dotis per sia kontribuo, el la iama dezerto restis nur parteto, nomata *Ĝurđevaĉki pijesci* (La sabloj de Ĝurđevac), kiu en la jaro 1963 estis proklamita speciala geografia kaj botanika rezervejo. Tiun modestan reston de la iama dezerto, pro sia botanika graveco nuntempe ofte vizitas turistoj. Kaj kie estas turistoj – tie eĉ la plej freneza ideo povas esti tute natura! Kun Saharo kaj dezerto, nepre asociiĝas kameloj, ĉu ne?

Fakte, la urbestro ne aĉetis nur kamelojn, sed ankaŭ

dromedarojn, por kiuj estas konstruita speciala loĝejo, nuntempe funkcianta kiel malgranda zoologia ĝardeno. La novajn loĝantojn oni aĉetis en Germanio, kaj la unuan fojon ili estis publike prezentitaj antaŭ Kristnasko 2016. Nun ili posedas siajn speciale trejnintajn prizorgantojn, kiuj nutras kaj purigas ilin, promeniĝas kaj montras al multaj scivolemaj okuloj, venantaj ĉiutage en la urbon, ofte nur pro tiuj strangaj loĝantoj!

La urbo mem en la senco de turisma reklamado ricevis treege grandan favoron de la televido, gazetaro kaj filmistoj, kiuj komencis filmadi scenojn el dezerto ĝuste en la restintaj partetoj de la iama Kroata Saharo, kaj – tute nature – la kameloj kaj dromedaroj estas inkluzivitaj kiel neeviteblaj aktoroj.

Se ankaŭ vi foje troviĝos en Ĝurđevac, nepre vizitu la bonanimajn stelulojn en ilia nova hejmo. Ili evidente ne protestas kontraŭ la translokiĝo el Germanio, sed tute bone fartas kaj amike rilatas al turistoj.





TELEVIZIJA

En la **Varaždina televido** (Varaždinska televizija – VTV), la 11-an de januaro estis elsendita la programo *VekERICA* (Vekhorloĝo), en kiu tre konvinke pri Esperanto parolis **Sreĉko Radulović**, aktivulo de la loka Esperanto-societo, kiu anoncis baldaŭan starton de Esperanto-kurso, gvidotan de profesoro **Siniša Horvat**.



En la multnacia magazino *Prizma* (Prismo) de la **Kroata televido**, kiu pritraktas temojn de

Pri Esperanto en radio kaj televido

minoritatoj, pri Esperanto, okaze de la malfermo de la ekspozicio *Mia unua alfabetlibro* en Daruvar, estis intervjuita la sekretariino de Bjelovara Esperantista Societo **Grozdana Grubišić-Popović**. La magazino etis elsendita la 17-an de februaro 2018.



Al Esperanto kaj interlingvito estis dediĉitaj eĉ du elsendoj de la **Kroata radio** el la serio *Jezik i predrasude* (Lingvo kaj antaŭjuĝoj), en kiuj en la scienca tono parolis d-ro **Velimir Piškorec** el la Germana fako de la Filozofia fakultato de

la Universitato en Zagrebo. La elsendoj estis aŭskulteblaj en la unua programo de la Kroata radio la 20-an kaj 28-an de februaro.



En la elsendo *Hrvatima izvan domovine* (Al la kroatoj ekster la patrujo) de la **Kroata radio**, la 22-an de februaro gastis **Spomenka Ŝtimec**, kiu parolis pri la noveldonita enciklopedia verko *Nia diligenta kolegaro* de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov.



KER-ekzameno denove en Subotica (Serbio)

La Esperanto-societo *Tibor Sekelj* el Subotica informas, ke jam la kvaran fojon ĝi organizos KER-ekzamenon (*Komuna Eŭropa Referenckadro*) je niveloj B1, B2 kaj C1, kiuj okazos kadre de la 7-a Tutmonda Ekzamentago.

La ekzamensesioj okazos la 16-an de junio 2018 je la 8h30 en Politeknika Lernejo (Politehniĉka ŝkola) en Subotica.

Ĉiuj kandidatoj estas petataj aliĝi **ĝis la fino de aprilo**, sed prefere kiel eble plej frue, elektante unu kompletan nivelon, aŭ nur skriban, eventuale parolan parton de la elektita nivelo.

La ekzamenoj estas pagataj. Unu ekzamenparto (skriba aŭ parola) kostas: B1 – 17 eŭrojn, B2 – 19 eŭrojn, C1 – 21 eŭrojn. La menciitaj prezoj validas nur por B-landoj laŭ la loĝloko de difinita kandidato. La ekzamenkotizojn la organizantoj devas pagi komence de majo, kaj estas petata frua pago.

Por la aliĝintaj kandidatoj la organizantoj en Subotica ofertas helpon en trovado de favorprezaj tranoktejoj kaj manĝoservoj. Post la ekzamenoj okazos ankaŭ amika renkontiĝo.

La ĉefa kunordiganto de KER-ekzamenoj estas **Katalin Kováts**, kaj ŝia kunlaboranto en Subotica estas la societa sekretario **Aranka Laslo**.

Per KER-ekzameno vi havas la eblecon konfirmi vian scion de Esperanto je diversaj niveloj kaj akiri kvarlingvan atestilon de la budapeŝta ŝtata ekzamentcentro, la Supera Fremdlingva Trejnejo (ITK) de la Budapeŝta Universitato *Rolando Eötvös* (ELTE), agnoskatan en- kaj ekstermovade.

Por pliaj informoj bonvolu kontakti:

Aranka Laslo – rete: laslo.az@gmail.com; skajpe: laslo.aranka

telefono: +381(0)24 561 462 (prefere lunde, ĵaŭde aŭ vendrede, 21h00-22h00), aŭ

Kristina Kujundžić:

telefono: +381 (0)24 524 819.

Ĥristina Kozlovska

Fabelo pri la Nigra Bagnulo (Казка про Чорного Каторжника)

Iun tagon viro kuŝiĝis sur la varman herbon en la kampo por ripozi. Tiel li kuŝadis kaj admiris la pejzaĝon, kaj ĝojis pri la varma somero. Ĉirkaŭe insektoj zumadis, kaj la suno agrable varmigis lian haŭton. Estis kviete kaj bone en la animo de la viro, kaj li jam sentis dormemon, kiam li subite ekaŭdis strangajn sonojn. Li retrorigardis – neniu estis, li leviĝis, sed tamen neniu vidis. Li kuŝiĝis sur la teron denove kaj aŭdis ion denove. La viro fiksaŭskultis, ĝis li komprenis, ke la sonoj venis ne de ie ajn, sed de sube, de sub la tero. Li alpremis sian orelon al la varma herbo kaj senmoviĝis. Do, io frapas kaj batas tie en la profundo de la tero, sed ne nur frapas, sed ankaŭ ĝemas, kaj tiel peze, ke la koro disŝiriĝas je pecoj, kaj larmoj plenigas la okulojn. Ankaŭ la viro frapis la teron per sia pugno, kaj tiel forte, kiel li nur povis.

– Kiu vi estas kaj kiel vi trafis tien? – la viro kriis al la tero, sed la tero silentis kvazaŭ muta. – Kiu vi estas? – li ripetis.

– Mi estas la Nigra Bagnulo – aŭdiĝis el sub la tero. Dum mia tuta vivo mi laboras peze ĉi tie en mallibero, mi ne vidas la veran mondon, mi ne scias aŭ

ne memoras, kiel aspektas tiu vera mondo. Mia haŭto nigriĝis, mia koro malmoliĝis, mia dorso fleksiĝis.

La viro kompatis la Nigran Bagnulon, kaj tiel kompatis, ke li ekploris, kaŝante siajn larmojn en la herbo.

– Ne ĉagrenu, Nigra Bagnulo – la viro kriis denove – Mi liberigos vin en la realan mondon, baldaŭ vi enspiros puran aeron, baldaŭ vi rektigos viajn ŝultrojn, baldaŭ vi varmiĝos sub la karesa suno. La viro impetis hejmen por preni fosilon, revenis kaj komencis fosi la kavon. La viro fosis dum unu tago, fosis dum la dua, falis sur la teron plurfoje senfortiĝinta, sed kiam li aŭdis pezan ĝemadon de la Nigra Bagnulo, li estis forgesinta tuj pri sia laciĝo kaj denove okupiĝis pri sia laboro. Ankaŭ la Nigra Bagnulo fosbatis la malmolan teron de sia flanko. Ili fordonis multajn fortojn al tiu laboro, multajn tagojn, kaj finfine ili penetris tra la tero unu al la alia. La viro kaptis nigran maldikan manon, kiu aperis el sub la tero kaj tiris ĝin al si. Li eltiris finfine la Nigran Bagnulon el lia infero. La viro ĝojis kvazaŭ etulo, purigis de la abomeninda tero la Nigran Bagnulon, donis akvon por ke li sattrinku, donis panon por ke li satmanĝu. Ili sidiĝis proksime al la kavo apud la arbo, la viro deziregis montri al la Nigra Bagnulo la veran mondon, kiun tiu eĉ ne memoris, deziregis rakonti, kio tie okazas.

– Ho, kia agrabla freŝa venteto – diris la viro al la Nigra Bagnulo – la vetero ŝanĝiĝas, baldaŭ pluvos iomete.

– Ĝi estas agrabla, sed ne tre, – respondis la Nigra Bagnulo ŝrumpante, – ĵus estis varme, nun estas jam malvarmete, tro rapide ĉio ŝanĝiĝas ĉi tie ĉe vi sur la tero. Sed ĉe mi sub la tero la temperaturo estas ĉiam la sama, tie vi ne ŝvitos kaj ne frostiĝos, ne estas surprizoj por vi, ĉio estas simpla kaj komprenebla.



Ĥristina Kozlovska / Христина Козловська (naskita la 1-an de majo 1989 en Kolomeo, Ivano-Frankivska Provinco) estas nuntempa ukraina verkistino, Ŝi estas laŭreato de kelkaj ukrainaj literaturaj premioj kaj de ukraina-germana literatura premio *Oles Honĉar*. Ĥristina Kozlovska estas aŭtorino de la proza libro *Pli valora ol oro*, Discursus, 2015. Krom en la germanan, ŝiaj unuopaj verkoj estas tradukitaj ankaŭ en Esperanton kaj aperis en *Ukraina Stelo*, *Penso* (Ĉinio), *La Riverego* (Kanado), *Saluton kaj Beletra Almanako* (Usono), *Turka Stelo* (Turkio), *Pola Esperantisto* (Pollando) kaj brajle en *Esperanta ligilo* (Ĉeĥio).

– Rigardu la ĉielon, kia beleco! – la viro montris la ĉielarkon, kiu aperis post la pluvo.

– Kia ajn beleco estu, sed mi ne tre volas rigardi la ĉielon, ĉio estas tiel hela kaj blindiga ĉi tie, ke mi miras, kiel homoj ankoraŭ ne perdis la vidkapablon pro ĉio ĉi. Miaj okuloj doloras pro via hela lumo. Sed ĉe mi sub la tero ĉio alias, ekzistas nenio por rigardi foren, oni ne bezonas streĉi la vidkapablon. Mi havas mian laboron antaŭ mi, do mi rigardas ĝin.

Ankaŭ ĉi-foje la viro diris nenion, kaj poste li denove ripetis sian parolon:



Ilustris: Oleh Loburak

– Rigardu, kiaj belaj floroj kreskas ĉirkaŭ vi, kliniĝu kaj flaru. Mi certas, ke vi ne flaris tiajn odorojn dum longa tempo.

– Ho ne, dankon, mi flaras eĉ sen kliniĝo, ĝi estas tro akra por mi. Sed ĉe mi sub la tero ne ekzistas tiaj akraj odoroj, la tero kaj ŝtono ĉiam odoras same, mi al kutimiĝis nur al ĉi tiuodoro.

Kaj la viro denove miris pri la vortoj de la Nigra Bagnulo, sed nur levis siajn ŝultrojn.

– Jen prenu ĉi tiujn novajn vestojn kaj alivestiĝu, kaj poste ni iros pli malproksimen kaj mi montros al vi ankoraŭ pli grandajn belajojn de ĉi tiu tero – la viro donis al li la vestojn.

La Nigra Bagnulo vestis sin, sed anstataŭ sekvi la viron, li

denove sidiĝis apud la arbo.

– Kio okazis, – la viro demandis, – kial vi ne sekvas min?

– Viaj novaj vestoj estas tre malkomfortaj por mi, bonfarulo mia – la Nigra Bagnulo respondis sulkiginte la vizaĝon, – ili estas malvastaj kaj frotas mian haŭton. Tamen en miaj ĉifonoj, kvankam ili estas malbelaj, estis malpezaj kaj malstrikaj, mi bone dormis kaj laboris en ili.

– Ne gravas, vi kutimiĝos al la novaj vestoj. Kaj al nia lando vi tute ne bezonas al kutimiĝi, ĝi estas belega kaj favora por ĉiu homo. Vi havis grandan bonŝancon trovi bonan vojon sur la surfacon kaj vi ne plu estas la Nigra Bagnulo, ne, nun vi estas homo. Nur atendu – mi kuros kaj portos por

vi bonajn ŝuojn, ni povos iri tre malproksimen kun vi por rigardi aliajn landojn, por ke vi vidu plene la belecon de la tero, ŝatu plene vian liberon.

La viro impetis hejmen por preni ŝuojn kaj revenis jam post momento, sed li jam ne trovis la Nigran Bagnulon apud la arbo. La viro ne komprenis, kien li estis malaperinta, do li iradis kun tiuj ŝuoj en la manoj kaj vokis lin ĉien kaj kriis, sed la Nigra Bagnulo ne respondis. La viro ĉesis voki lin nur kiam li revenis al la kavo, al tiu, el kiu li eltiris lin. Apud la freŝe fosita tero kuŝis la novaj vestoj de la Nigra Bagnulo.

Elukrainigis Petro Palivoda



Atendante novajn librojn de Julian Modest

Baldaŭ ĉe Dokumenta Esperanto-Centro aperos du novaj libroj de la tre populara Esperanta prozisto Julian Modest el Bulgario: la novelaro *Dancanta kun ŝarkoj* kaj la romano por adoleskuloj *La enigma trezoro*. Por stimuli vian scivolemon pri la verkoj, kun la permeso de la aŭtoro ni publikigas unu el la noveloj el *Dancanta kun ŝarkoj*.

Du biletoj por teatro

Dinko, la maljuna pensiulo, ĉiun posttagmezon venis en la parkon, sidiĝis sur unu el la benkoj kaj rigardis la homojn, kiuj preterpasis. Estis gejunuloj, studentoj, gelernantoj, aŭ viroj, virinoj, kiuj certe laboris en la proksimaj oficejoj. Ili ĉiuj rapidis kaj tute ne rimarkis Dinkon, kiu por ili verŝajne similis al monumento, silenta kaj senmova. Monumento, kiu bezonas nenion. Vere, post la emeritiĝo Dinko bezonis nenion, nek monon, nek renkontiĝojn kun konatoj, kiuj delonge forgesis lin. Liaj tagoj jam pasis malrapide, interligitaj kiel per longa, peza fera ĉeno, kaj ofte li demandis sin, ĉu hodiaŭ estas mardo aŭ merkredo.

Iun fojon, kiam li silente sidis sur la benko en la parko, rigardante florojn sur la bedo, antaŭ li haltis junulo kaj afable salutis lin:

– Bonan tagon, sinjoro Milov.

Dinko mire alrigardis la junulon, kiu ŝajnis al li tute nekonata. „De kie li scias mian nomon” – demandis sin Dinko.

– Vi ne rekonis min? – ekridetis la junulo.

– Ne – konfesis iom ĝenite Dinko.

– Mi estas Vesko. La knabo, al kiu vi sen bileto permesis spekti la dimanĉajn teatrajn prezentadojn.

Nun Dinko rememoris, kaj antaŭ liaj okuloj aperis bildo, kiun li delonge forgesis. Antaŭ jaroj Dinko estis aktoro en la teatro. Tiam li ludis komikajn rolojn en preskaŭ ĉiuj teatraĵoj kaj ankaŭ en la teatraĵoj por infanoj. Iun fojon dimanĉe estis infana prezentado. Antaŭ la enirejo de la teatro staris gepatroj kaj infanoj por eniri la salonegon. Tiutempe estis la kutimo, ke la geaktoroj renkontu la spektantojn antaŭ la teatra enirejo kaj salutis per la vortoj: „Bonvenon kaj agrablan amuzon.” Dinko staris ĉe la pordo kaj bonvenigis la gepatrojn kaj la infanojn, kiuj rapidis por eniri. Kiam preskaŭ ĉiuj eniris, Dinko rimarkis, ke antaŭ la pordo staras nigrahara knabo kun grandaj malhelaj okuloj kiel olivoj.

– Kial vi ne eniras? – demandis Dinko la knabon.

– Mi ne havas bileton.
 – Ĉu viaj gepatroj ne aĉetis por vi bileton?
 – Ne.
 – Kial?
 – Miaj gepatroj ne estas ĉi tie. Ili laboras en Hispanujo.
 – Kaj kiu zorgadas pri vi? – Dinko alrigardis la knabon.
 – Mia avino.
 – Ŝi certe povis aĉeti bileton kaj veni kun vi por spekti la teatraĵon.
 – Ŝi diras, ke ŝi ne ŝatas infanajn teatraĵojn – respondis mallaŭte la knabo.
 – Kiel vi nomiĝas?
 – Vesko.
 – Bone, Vesko. Eniru kaj spektu la teatraĵon – diris Dinko kaj mane enkondukis la knabon en la salonegon.
 – Ĉu sen bileto? – demandis Vesko mire.
 – Jes, sen bileto. Mi permesas al vi.


La grandaj olivaj okuloj de Vesko, kiuj jam naĝis en larmoj, ekbrilis ĝoje.

Post du semajnoj Vesko denove staris antaŭ la teatro kaj Dinko denove permesis al li eniri sen bileto. Tio ripetigis kelkfoje. Certe Vesko ege ŝatis la teatron kaj deziris spekti ĉiujn infanajn teatraĵojn.

– Vesko, vi jam estas plenkreska viro – diris Dinko. – Kie vi laboras?

– Mi estas aktoro, sinjoro Milev, kaj nun mi ludas rolojn en la sama teatro, en kiu vi iam aktoritis. Kelkfoje mi vidis vin ĉi tie, en la parko, kaj hodiaŭ mi decidis alparoli vin kaj doni du biletojn al vi kaj via edzino por la teatra prezentado ĉi-vespere. Mi ĝojus, se vi venus por spekti min.

– Dankon, Vesko, mi nepre venos, sed bedaŭrinde mia edzino antaŭ kelkaj jaroj forpasis, do mi venos kun iu amiko – diris Dinko kaj eksentis larmojn en siaj okuloj, similajn al tiuj larmoj, kiujn li iam, antaŭ multaj jaroj, vidis en la grandaj olivaj okuloj de Vesko, kiam li staris sola ĉe la teatra pordo.



Julian Modest (Georgi Miĥalkov) naskiĝis la 21-an de majo 1952 en Sofio, Bulgario. En 1977 li finis bulgaran filologion en la Sofia Universitato *Sankta Kliment Ohridski*, kie en 1973 li komencis lerni Esperanton. Jam dum la universitataj studoj li aperigis Esperantajn artikolojn kaj poemojn en revuo *Bulgara Esperantisto*. De 1977 ĝis 1985 li loĝis en Budapeŝto, kie li edziĝis al hungara esperantistino. Tie aperis liaj unuaj Esperantaj noveloj. Ĝis nun aperis dudeko da liaj libroj en Esperanto.

Julian Modest pli ŝatas modestajn, ordinarajn vivojn kaj neordinarecon en ili, kiun nur li vidas, ĉar li observas la aferojn siamaniere. Tiel en la noveloj *Dankesprimo*, *Du biletoj por teatro*, *Kristnaska kafo* kaj *Patrino* la aŭtoro rakontas pri malgrandaj faroj, kiuj ŝanĝis ies vivon kaj kiujn oni ne forgesas, ĉar temas pri iaspecaj destinaj okazaĵoj. La plej granda nombro da noveloj montras bonan konon pri la homaj psikologio kaj animo, eĉ se temas je iaspeca hiperboleca, fantazia okazaĵo, kiel en la novelo kies titolo donis la titolon al la libro mem – *Dancanta kun ŝarkoj*.

Zdravko Seleš en la postparolo al la novelaro *Dancanta kun ŝarkoj*

Prelegvojaĝo de Julian Modest en Francio

Inter la 28-a de majo kaj 23-a de junio ĉi jare, **Julian Modest** prelegvojaĝos en diversaj urboj de Francio.

Francaj esperantistoj povos renkonti kaj aŭskulti lin: en **Parizo** la 28-an kaj 29-an de majo, en **Bruselo** (Belgio) de la 29-a ĝis la 31-a de majo, en **Strasbourg** inter la 31-a de majo kaj 2-a de junio, en **Lyon** inter la 2-a kaj 5-a de junio, en **La Ciotat** inter la 5-a

kaj 7-a de junio, en **Montpellier** inter la 7-a kaj 9-a de junio, en **Ariège** inter la 9-a kaj 12-a de junio, en **Toulouse** inter la 12-a kaj 14-a de junio, en **Périgueux** inter la 14-a kaj 16-a de junio, en **Brive** inter la 16-a kaj 18-a de junio, en **Limoges** la 18-an kaj 19-an de junio, en **Châteauroux** inter la 19-a kaj 21-a de junio kaj denove en **Parizo** inter la 21-a kaj 23-a de junio. Francion

li devus forlasi laŭplane la 23-an de junio. Francaj samideanoj eluzu la okazon por antaŭmendi liajn plej novajn librojn antaŭ lia prelegvojaĝo en ilia lando. Bonvolu uzi la eblecon ricevi aŭtografon de la aŭtoro antaŭ ol la libroj estos prezentitaj aliloke. *Dancanta kun ŝarkoj* kostas 9,00 eŭrojn kaj *La enigma trezoro* 6,60 eŭrojn + 15% sendokostoj. Triona rabato ekde 10 ekzempleroj.



La 70-a IFEF-Kongreso

Kiel konte, la 70-a IFEF-kongreso okazos en Vroclavo (Pollando) inter la 19-a kaj 25-a de majo. Jen provizora kongresa kaj postkongresa programoj:

Sabato, la 19-an de majo

10h00 – 21h00: Akceptado / Informado
 17h00 – 18h00: Kunveno de la IFEF Estraro kaj LKK
 18h00 – 19h00: Kunsido de la IFEF-Estraro
 19h00: Interkona vespero... poste foririo por rigardi Vroclavan Multmedian Fontanon

Dimanĉo, la 20-an de majo

08h00 – 20h00: Akceptado / Informado
 10h00 – 12h00: Solena Inaŭguro
 12h00 – 12h30: Komuna foto, Gazetara konferenco
 14h30 – 16h30: Urbovizitado piedire – D1a
 17h00 – 18h00: Kunsido de la laborgrupoj (raportoj pri agado), publika
 17h00 – 18h00: Esperanto-kurso por komencantoj
 20h00 – 22h00: Nacia vespero

Lundo, la 21-an de majo

09h00 – 12h00: Nepublika Komitatkunsido
 09h00 – 12h00: Esperanto-kurso por komencantoj
 09h00 – 12h00: Urbovizitado – D1b (Botanika ĝardeno)
 14h00 – 18h00: Kunsido de la Faka Komisiono
 14h00 – 15h30: Ateliero pri informadiko (bazaj informoj)
 15h30 – 18h00: Ateliero pri ĵurnalismo (pri: kiel verki ĵurnalistan artikolon kaj efike kunlabori kun redakcioj / ĵurnalistoj)
 20h00 – 21h00: Prelego pri la regiono
 21h00 – 22h30: Venonta kongreso sin prezentas

Mardo, la 22-an de majo

09h00 – 11h00: Ĉefa fakprelego kaj aliaj prelegoj
 09h00 – 11h00: Esperanto-kurso por komencantoj
 11h30 – 21h00: Faka ekskurso D2 – Fervoja muzeo en Jaworzyna Śląska (per trajno *Koleje Dolnośląskie*) + vizitado de Świdnica (kun tagmanĝo)

Merkredo, la 23-an de majo

09h00 – 12h00: Esperanto-kurso por komencantoj
 09h00 – 12h00: Plenkunsido
 12h00 – 13h30: Movadaj aferoj; konkluda kunsido de la laborgrupoj, publika
 16h00 – 20h00: D3 – Urbovizitado per ŝipeto sur rivero (kun vespermanĝo), poste Dancespero

Ĵaŭdo, la 24-an de majo

09h00 – 18h00: Ekskurso T1 – tuttaga – Karkonosze, Jelenia Góra, Kowary (kun tagmanĝo)
 20h30 – 22h30: Koncerto; Ĝisrevida vespero

Vendredo, la 25-an de majo

09h00 – 10h00: Solena fermo
 10h00 – 10h30: Kunveno de la IFEF-Estraro kaj LKK
 10h30 – 11h30: Estrarkunsido de IFEF
 12h30: Forveturo per trajno al Krakovo, kie okazos postkongreso

Provizora programo de la Postkongreso (25-a - 28-a de Majo 2018)

Vendredo, la 25-an de majo

16h00: Akcepto
 18h00 – 21h00: Promenado tra malnova urbo

Sabato, la 26-an de majo

09h00 – 17h00: Tuttaga ekskurso al fama salminejo Wieliczka
 19h00 – 21h00: Kultura programo – kunveno kun lokaj esperantistoj

Dimanĉo, la 27-an de majo

09h00 – 16h00: Ekskurso al Wawel kaj Kazimierz (juda kvartalo)
 18h00 – 21h00: Kultura kaj arta programo

Lundo, la 28-an de majo

09h00 – Forveturo (Stacidomo Kraków Główny aŭ trajne al flughaveno Kraków – Balice)

Kongresa retejo: <https://ifef.vroclavo.damj.es/>

Aliaj fervojistaj eventoj en 2018

La 3-an de marto: Jarkunveno de Hungara Fervojista Esperanto-Asocio (HFEA)

La 10-an de marto: Jarkunveno de Fakkomitato de Fervojistoj Esperantistoj en Slovenio.

La 17-an kaj 18-an de marto: Francio – Staĝo por komencantoj kaj perfektiga kurso

La 17-an de marto: Jarkunveno de Ĉeĥa Fervojista Esperanta Asocio

Inter la 27-a kaj 29-a de aprilo: Kongreso de Franca Fervojista Esperanto-Asocio (FFEA)

Europejskie
Centrum
Edukacji
Międzynarodowej

Eŭropa Centro de Interkultura Edukado
kaj **Esperanto-Klubo** en Góra

invitas vin partopreni en la

TRIA INTERKULTURA MAJRENDEVUO

19-24 de majo 2018

ALVENU kaj **PASIGU** neforgeseblajn momentojn de AMO kun Stefano, **KANTU** kun Małgosia, Halina kaj JoMo, **MALSTREĈIĜU** manlaborante kun Ela kaj Ania, **VIZITU** belajn lokojn kun Ela kaj Teresa, **SATMANĜU** kun Regina kaj ŝiaj 12 amikinoj, **DANCU** kun kuraĝigistinoj, **BABILADU** pri artaĵoj, **FARU** lignofajron kaj **EKKONU** la **SEKRETON** de belkolorigo de ĉiutageco.

Ĉiutage je via dispono estos **HEJMA NUTRAĴPROVIZO** - hejmfaritaj manĝaĵoj.

Tio kaj multaj aliaj plezuroj atendas vin.

Ni komencos en Vroclavo per la

SESA EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ

kaj finos en Góra per granda

INTERKULTURA KONCERTO por la loĝantoj de la urbo

Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso:
festivalo.eo@gmail.com (skribante en la temo de la mesaĝo: majrendevuo)
aŭ telefone +48 692 551 131, +48 605 292 335

Verdaj horoj

Lunde, la 26-an de februaro, en Vroclavo, en la sidejo de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, iniciate de **Małgosia Komarnicka**, okazis la inaŭguro de nova programo de tiu organizo sub la komuna titolo *Verdaj horoj*. La programo okazos ĉiun trian lundon de monato. La celo de la programo estas stimuli aktivecon kaj vigligi la kunlaboron kun neesperantistaj medioj kaj disvastigi Esperanton. La ciklon malfermis **Halina Kuropatnicka-Salamon**, vroclava poetino, membro de la Asocio de Polaj Literaturistoj, brajlistino, sed antaŭ ĉio esperantistino. Dum la renkontiĝo la publiko havis la eblecon aŭskulti poeziaĵojn plenajn de „printempa ĝojo”, kiujn la aŭtorino mem legis. Tamen, la plej granda surprizo estis skribita per brajlo dediĉe al la partoprenantoj en poeziaj volumetoj fare de la aŭtorino.

Bela kaj unika akcento de la renkontiĝo estis ankaŭ aŭskultado de poeziaĵoj de **Elżbieta Karbowska** kaj **Halina Krakowska**, la studentinoj de Esperanto-kurso gvidata de **Małgosia Komarnicka**. La aŭtorinoj en siaj poeziaĵoj konvinkadis la aŭskultantojn pri profitoj, kiujn ni gajnas lernante la lingvon Esperanto. Fine de la renkontiĝo la publiko povis admiri pasian dancon de kuraĝigistinoj kun koloraj pomponoj el la danca grupo *Gracja* el Vroclavo.

La publiko estis ravita per la neforgesebla etoso de la renkontiĝo, ĉar ĝi estis escepte familia kaj favoris bonan babiladon pri kaj en Esperanto. Parton de la publiko kreis studentinoj de Esperanto-kursoj, kiuj invitis siajn amikojn. Dum tiu belega vespero eblis aŭskulti Esperanto-muzikon kaj gustumi bongustajn, hejmfaritajn kukojn, dolĉaĵojn, kafon kaj teon. La Eŭropa Centro de Interkultura Edukado komencis novan serion de la renkontiĝoj kun neesperantistoj tiel viglaritme kaj agrable, ke neniu deziris reveni hejmen... Ni jam tre kore invitas vin veni al Vroclavo al niaj sekvaj *Verdaj horoj* fine de marto (detalaj informoj ĉe: informado.eo@gmail.com kaj vizitante www.ecem.com.pl).

Lucyna Kowalewska

**Unu mano sola
ne povas aplaŭdi.**



(afrika proverbo)

www.movado-sen-nomo.net

Kunlaboro estas la bazo de ĉiu agado.

Kunlaboro signifas kune labori al komuna celo.

Kunlabori signifas aŭskulti kaj respekti la aliajn kunlaborantojn, kun iliaj fortaj kaj malfortaj flankoj.

Kaj por optimume **kunlabori** kun aliaj, necesas unuavice koni la proprajn fortajn kaj malfortajn flankojn!



Unua komuniko

La jubilea **20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco** okazos en **Bjelovar (Kroatio) inter la 8-a kaj 10-a de junio 2018**. Tiel decidis la Komitato de la Esperanto-Rondo de Alp-Adria, akceptinte la kandidatiĝon de Bjelovara Esperantista Societo por loka organizanto.

Konferencaj temoj

La konferenca ĉeftemo estas *Alp-Adria kaj Danubio*, kaj oni krome diskutos pri la temo *Publikaj rilatoj de esperantistoj kun neesperantistaj medioj*.

Prelegontoj pri la konferencaj temoj ĝis la fino de aprilo 2018 bonvolu proponi siajn prelegojn, kiuj daŭru maksimume 10 minutojn. Respektivajn prelegotekstojn oni sendu al **esperanto.bjelovar@gmail.com** por publikigo en speciala broŝuro.

Kotizo

Por ke la jubilea konferenco estu kiel eble plej solena prezento de nia agado, la Komitato kaj la lokaj organizantoj petas aliĝon kaj partoprenon de esperantistoj el la regionoj de Alp-Adria kaj Danubio, sed ankaŭ de alilandanoj. Por stimuli partoprenon, la organizantoj anoncas minimuman konferenckotizon de **7 eŭroj** (aŭ 50 kunaĵoj, por kroatoj). **La kotizo ne inkluzivos la kostojn de vojaĝo, loĝado, manĝoj kaj ekskuroj.**

Aliĝo

La aliĝilo baldaŭ troveblas ĉe: www.esperanto-bjelovar.hr

Aliĝi eblas ankaŭ per sendo de simpla retmesaĝo (nomo, adreso kaj kontakteblecoj) al lokaj organizantoj.

Transporto el kaj al Zagrebo

Bjelovar situas 90 kilometrojn de la kroatia ĉefurbo Zagrebo, de kie la organizantoj planas aranĝi dudirektan komunan busvojaĝon por unutagaj konferencanoj (sabate, la 9-an de junio). La vojaĝprezo baldaŭ anoncota. Bonvolu kiel eble plej baldaŭ rezervi vian sidlokon en la buso.

Loĝado

La organizantoj proponas favoreprezan loĝadon en privataj dultitaj ĉambroj *Sobe Mrak*



(<http://www.sobemrak.hr/>), kie esperantistoj estas jam konataj kaj ŝatataj gastoj, aŭ en la tre agrabla tranoktejo *Vita Nova* (<http://vitanova.hr/>) kaj *Hotelo Central* (<https://www.hotel-central-bjelovar.com.hr/home/>).

Provizora programo

Vendrede, la 8-an de junio: alveno de la konferencanoj, transpreno de konferencaj materialoj, loĝigo, kunsido de la Komitato de Esperanto-Rondo de Alp-Adria kaj trarigardo de la urbo.

Sabate, la 9-an de junio: la ĉefa konferenca tago kun oficiala malfermo, prelegoj pri ambaŭ temoj, kultura programo, asembleo de alp-adria esperantistoj, komuna vespermanĝo kaj amuza programo.

Dimanĉo, la 10-an de junio, estas rezervita por ekskurso al Daruvar kaj la tiea komuna tagmanĝo.

La organizantoj rezervas la rajton laŭnecese ŝanĝi la programon, kies aktualigojn vi povos sekvi ĉe: **www.esperanto-bjelovar.hr**

Lokaj organizantoj

Pri ĉiuj organizaj aferoj bonvolu skribi al lokaj organizantoj:

esperanto.bjelovar@gmail.com

La 29-a MKR okazos en Slovenio



MKR (Mont-Kabana Renkontiĝo) estas tradicia Esperanto-aranĝo por montmigrantoj kaj ŝatantoj de montaro. Ĝi okazas ĉiujare ekde 1990, kutime aŭtune (en septembro aŭ oktobro), alterne en diversaj mezeŭropaj landoj, kaj ĝin kutime partoprenas inter 25 kaj 50 esperantistoj. Bonvenas ĉiuj naturemuloj sendepende de la aĝo, kaj ankaŭ Esperanto-familioj kun infanoj.

Ĝi estis iniciatita kaj en la unua jardeko de sia ekzistado (1990-1999) organizata de Aŭstra Esperanto-Junularo (AEJ), kaj la ĉefan rolon tiutempe ludis Michael Martin, Axel Leitner, Helmut Brath kaj Tania Berger.

En la dua jardeko (2000-2009) orgnizis ĝin Vanja Radovnović, Mea Bombardelli, Milivoj Uroić kaj en 2005 Hrvoje Sandukčić nome de Kroatia Esperanto-junulara Asocio (KE-JA).

En la postaj jaroj la aranĝon organizis Christian Eppler en 2010, Višnja Branković kaj Vanja Radovanović en 2013, Vanja

Radovanović en 2011-2012, 2014-2015 kaj 2018, Enrico G. Borrello kun helpo de Vanja Radovanović en 2016 kaj Vanja Radovanović kun helpo de Jan Navratil en 2017.

La ĉi-jara, 29-a MKR, okazos inter la 20-a kaj 23-a de septembro en la montkabano *Erjavčeva koča* (1525 m) en nordokcidenta angulo de Slovenio, apud la fama trapasejo Vršič (1611 m) en Juliaj Alpoj. La nomo de la ejo eble jam estas konata al vi: ĝuste tie okazis la unua ne-aŭstra MKR en la jaro 2000 kaj ĝuste tie oni atingis la plej altan pinton de ĉiuj MKR-oj, Prisojnik, je la alteco de 2547 metroj.

Ĉi-jare, 18 jarojn post tiu fama 11-a MKR, oni ripetos la ekskursojn, vizitonte la jam menciitan pinton Prisojnik (2547 m) kaj la najbaran Mala Mojstrovka (2332 m).

La montkabano *Erjavčeva koča* disponas pri 2-litaj kaj 3- ĝis 8-litaj kaj plurlitaj ĉambroj.

Pliajn informojn bonvolu serĉi en la retejo de la aranĝo (vidu ĉi-sube).

La kotizoj en 2018:

- ĝis la 15-a de aprilo: 85 / 80 / 72 eŭroj (5 eŭroj da rabato se la tuta sumo estos tuj antaŭpagita!)
- inter la 15-a de aprilo kaj 15-a de aŭgusto: 95 / 90 / 82 eŭroj
- poste kaj surloke: 100 / 95 / 87 eŭroj

La organizanto:

vanja.radovanovic@ericsson.com

Listo de MKR-oj

- 1990 Tauplitzalm (Aŭstrio)
- 1991 Pichl (Aŭstrio)
- 1992 Trofaiach (Aŭstrio)
- 1993 Mitterbach (Aŭstrio)
- 1994 Murau (Aŭstrio)
- 1995 Aigen im Ennstal (Aŭstrio)
- 1996 Werfen (Aŭstrio)
- 1997 Wörth (Aŭstrio)
- 1998 Bad Goisern (Aŭstrio)
- 1999 Obertauern (Aŭstrio)
- 2000 Vršič (Slovenio)
- 2001 Platak (Kroatio)
- 2002 Logarska dolina (Slovenio)
- 2003 Tuk (Mrkopalj) (Kroatio)
- 2004 Pliskovica (Slovenio)
- 2005 Baške Oštarije (Kroatio)
- 2006 Storžič (Slovenio)
- 2007 Beli (Cres) (Kroatio)
- 2008 Uskovnica (Slovenio)
- 2009 Starigrad-Paklenica (Kroatio)
- 2010 Reichenau (Aŭstrio)
- 2011 Valvasorjev dom (Slovenio)
- 2012 Lovran (Kroatio)
- 2013 Jankovac (Kroatio)
- 2014 Sillian (Aŭstrio)
- 2015 Veli Lošinj (Kroatio)
- 2016 Isola Santa (Italio)
- 2017 Žiarska chata (Slovakio)
- 2018 Vršič (Slovenio)



Kroata monero de 25 kunaoj

En 1997, okaze de la Unua kongreso de kroataj esperantistoj (aranĝita la 31-an de majo kaj 1-an de junio en Zagrebo), Kroata nacia banko (*Hrvatska narodna banka*) eldonis specialan porokazan moneron de 25 kunaoj kun dulingva (kroata kaj Esperanta) tekstoj. Temas pri monero, kiu ekde la 24-a de junio 1997 ĝis nun estas valida cirkulanta mono.

La monero havas diametron de 32 milimetroj, formon de 12-pinta poligono kaj pezon de 12,75 gramoj. Estis eldonitaj entute 300.000 ekzempleroj, kaj la ĉefan meriton por ĝia eldono havas la membro de Kroata akademio de sciencoj kaj artoj **Dalibor Brozović** (1927-2009), konata kroata lingvisto, tiuperioda politikisto (vicprezidanto de Kroatio en 1990) kaj direktoro de Kroata leksikografia instituto (ĝis 1991). Brozović estis esperantisto ekde 1946, fama interlingvisto kaj esperantologo, ekde 1992 prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo (kiu organizis la unuan kongreson de kroataj esperantistoj), membro de Honora patrona komitato de UEA, prezidanto de la LKK de la 86-a UK en Zagrebo ktp. Samtempe kun la monero, li entreprenis kaj realigis la eldonon de kroataj Esperantaj poŝtmarkoj: la unuan en 1997, okaze de la Unua kongreso de kroataj esperantistoj, kaj la duan en 2001, okaze de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto).

La centra parto de la 25-kunaa monero estas produktita el alojo, konsistanta el 92% da kupro, 6% da aluminio kaj 2% da nikelo, dum la ekstera ringo konsistas el 75% da kupro kaj 25% da nikelo. Ĝi estas produktita en la kroata monfarejo (*Hrvatski novčarski zavod*; <http://www.hnz.hr/>) en Zagrebo, en kies retejo troviĝas malonga priskribo de la monero, same kiel en la retejo de Kroata nacia banko: <https://www.hnb.hr/-/25-kuna-prvi-kongres-hrvatskih-esperantista>.



Supre (unua vico, maldekstre): Dalibor Brozović
(unua vico, dekstre): Damir Mataušić.

Malsupre: averso kaj reverso de la 25-kunaa monero.

La eldonon de la monero difinis la Konsilantaro de Nacia banko de Kroatio per la *Decido*

Aŭtoro de la monero estas la renoma kroata akademika skulptisto kaj medalisto **Damir Mataušić** (1954) el Zagrebo (www.matausic.net).

Kvankam la 25-kunaa monero estas oficiala cirkulanta mono de Kroatio, en la cirkulado ĝi malofte aperas, ĉar krom sia ĝenerala valoro, ĝi havas multe pli grandan numismatikan valoron. Jam delonge ne eblas havigi ĝin krom en aŭkcioj, kie ĝi atingas multe pli altan prezon ol estas ĝia reala valoro.

La eldonon de la monero difinis la Konsilantaro de Nacia banko de Kroatio per la *Decido*

pri bazaj karakterizaĵoj de la porokaza cirkulanta monero de 25 kunaoj „Unua kongreso de kroataj esperantistoj” (kroatlingve: Odluka o osnovnim obilježjima prigodnog optjecajnog novca od 25 kuna “Prvi kongres hrvatskih esperantista”), aperinta en *Narodne novine*, la oficiala gazeto de Respubliko Kroatio, numero 58 de la 9-a de junio 1997, kaj per la posta *Decido pri cirkuligo*, aperinta en la numero 60 de la 11-a de junio 1997. Tiujn decidojn subskribis la tiama Prezidanto de la Konsilantaro de Nacia banko de Kroatio, d-ro Marko Škreb.

Josip Pleadin
en: *Esperanta Numismatiko*
jarkolekto 4, n-ro 4, paĝo 11

La 10-a boatado invitas vin!

Esperanto-boatado sur la rivero Kupa memorigas nin pri la historia „grenvojo”, kiu sian kulminon atingis en la 18-a kaj 19-a jarcentoj. Tiuvoje el Sisak al Karlovac oni transportadis grenon, lignajn konstrumaterialojn, tabakon, ledon, mielon kaj aliajn produktojn. Tiujn varojn el Karlovac oni transportis en ĉaroj kaj sur ĉevaloj en la internon de la lando kaj al la adriatika marbordo.

La 10-a jubilea Esperanto-boatado okazos sur tiu sama rivero inter la 28-a de julio kaj 5-a de aŭgusto 2018. Kotizoj por partoprenantoj estas jenaj: por pagoj ĝis la 31-a de marto: 160 eŭroj; ĝis la 30-a de aprilo: 170 eŭroj; ĝis la 31-a de majo: 180 eŭroj; ĝis la 30-a de junio: 190 eŭroj kaj ĝis la 15-a de julio: 200 eŭroj.

La partoprenkotizo inkluzivas: boatadon (en 5- kaj 6-metraĵoj kun ekstera motoro) en kvin etapoj inter la urboj Karlovac kaj Sisak (entute 135 kilometrojn), kampadon en improvizitaj bivaĵoj en kvin lokoj, sinbanadon sur pli ol 15 sablaj riveraj strandoj, distriĝon je falĉado de herboj per maŝinfalĉilo, tri manĝojn tage, trarigardon de urboj Karlovac kaj Petrinja, kontraŭakcidentan asekuron dum la boatado, kurson de Esperanto por komencantoj, diplomojn pri partopreno kaj kultur-artan programon.

Aliĝilojn bonvolu peti ĉe la organizanto: **boatado.kask@gmail.com** aŭ **esperanto.sisak@gmail.com**

Partoprenkotizo pageblas al bankkonto de Esperanto-societo



Sisak, Lonjska 74, HR-44000 Sisak, IBAN: HR1024840081104788944 ĝis la 15-a de julio 2018. Infanoj ĝis 15-jaraj, akompanataj de la gepatroj, pagas 50-procente rabatitan partoprenkotizon.

La partoprenantoj de-vas posedi minimume: tendon, dormosakon, manĝilaron kaj dokumentojn. Tendon oni povas ankaŭ lui je 20 eŭroj, kaj dormosakon sampreze por 9 tagoj ĉe la organizanto.

La boatado havas karakterizaĵojn de aventuro en la naturo kaj ne konsilindas al personoj neaventuremaj, malsanaj aŭ ne scipovantaj naĝi. Parto de la teknikaj helpantoj ne parolas Esperanton!

Konciza programo: *Vendrede (la 27-an de julio):* transporto de boatoj kaj ekipaĵoj, la unua bivako en Karlovac; *Sabate (la 28-an de julio):* alveno de partoprenantoj, tra-

rigardo de Karlovac, kulturarta programo; *Dimanĉe (la 29-an de julio):* la unua etapo de la boatado, renkontiĝo kun kroataj esperantistoj en Kamensko, vizito al la paŭlana monaĥejo; *Lunde (la 30-an de julio):* la dua etapo de la boatado (Šišljavić-Pokupsko, 34 km); *Marde (la 31-an de julio):* Esperanto-kurso, ripozo; *Merkrede (la 1-an de aŭgusto):* Esperanto-kurso, kulturarta programo, ripozo; *Ĵaŭde (la 2-an de aŭgusto):* Esperanto-kurso, kulturarta programo, ripozo; *Vendrede (la 3-an de aŭgusto):* la tria etapo de la boatado (Pokupsko-Letovanić, 33 kilometroj); *Sabate (la 4-an de aŭgusto):* la kvara etapo de la boatado (Letovanić-Petrinja, 16 kilometroj), trarigardo de Petrinja; *Dimanĉe (la 5-an de aŭgusto):* la kvina etapo de la boatado (Petrinja-Sisak, 20 km), fino de la aranĝo. Detala programo riceveblas laŭpete ĉe la organizanto.



**Esperanto-societo
Sisak
Lonjska 74
44000 Sisak
Kroatio**

Anonco

Esperanto-societo Sisak, la organizanto de la jubilea **10-a Esperanto-boatado sur la rivero Kupa** de Karlovac ĝis Sisak, kiu okazos inter la 27-a de julio kaj 5-a de aŭgusto 2018 en Kroatio, por la bezonoj de kvalita komunikado inter esperantistoj el diversaj landoj dum la 10-a boatado, serĉas **du esperantistojn kun bona kono de parola Esperanto**, ne pli ol 50-jaraĝajn, kiuj fariĝus parto de la Organiza komitato de la 10-a boatado, al kiuj ĝi ofertas senpagan partoprenon en la boatado kaj popersonan honoraron de 250 eŭroj.


Pliaj informoj ĉe: **esperanto.sisak@gmail.com** aŭ **boatado.kask@gmail.com**

La kapreolido Pirgo de kroata verkistino **Andelka Martić** baldaŭ aperos en la persa lingvo, en la traduko farita de **Achtar Etemadi** el Teherano pere de ĝia Esperantlingva eldono! Antaŭ kelkaj tagoj ni konvinkigis pri tre bele ilustrita titolpaĝo de la persa eldono, pretigita de la irana pentristo, s-ro **Aidin Sarsabili**.



Nia diligenta kolegaro

En februaro 2018 la rusia eldonejo *Sezonoj* eldonis leksikonon *Nia diligenta kolegaro* kun „biografioj de 200 eminentaj esperantistoj”, kompilitan de Halina Gorecka kaj Alekxander Korĵenkov. La kompilintojn en la laboro helpadis diverslandaj kunlaborantoj. La eldonon finance subtenis la usona fonduso *Esperantic Studies Foundation*, kaj la verko havas 320 paĝojn. Inter la 200 elektitaj eminentuloj de nia movado troviĝas ankaŭ kelkaj kroatoj: Kreŝimir Barković, Dalibor Brozović, Srđan Flego, Marinko Gjivoje, Ivo Lapenna, Spomenka Ŝtimec kaj Zlatko Tiŝljar, kaj Nikolaj Hoĥlov kaj



Tibor Sekelj, kiuj aktivis en Kroatio. La libro jam aĉeteblas en movadaj libroservoj kaj ĉe la eldonisto je 30,00 eŭroj + sendokostoj.

La retejo de la **Societo pri la rusa lingvo kaj kulturo** el Zagrebo, redaktata de **Mato Ŝpekuljak**, havas ankaŭ sian Esperantlingvan parton:

<http://www.ruskijezik.info/croatian/index.php/eo/>

Bjelovara Esperantista Societo jarkunvenis

Bjelovara Esperantista Societo (BES) dimanĉe, la 25-an de februaro, okazigis sian regulan jarkunvenon, dum kiu estis aprobitaj raportoj pri laboro kaj financoj en 2017, kaj akceptitaj planoj por 2018. Laŭ laborplano, inter la 8-a kaj 10-a de junio, BES gastigos la *20-an Alp-Adrian Esperanto-Konferencon* kaj la 22-an kaj 23-an de septembro la 6-an renkontiĝon *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*. Oni planas eldoni la romanon de Goran Tribuson *Fruaj tagoj* kaj jam intense pretigas sin por festado de la 110-a datreveno de Esperanto



en sia urbo (2019). Por tiu okazo oni planas eldoni monografion pri Esperanto en Bjelovar.

Dum la jarkunveno oni konstatis, ke la pasinta jaro estis

unu el la plej eventoplenaj periodoj en la historio de Esperanto en la urbo, kio estis kronita per la *Jara premio de KEL*, kiel la plej aktiva kroatia societo dum 2017.

Forgesitaj samideanoj

En la sidejo de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj en Radniĉki dol 1, la 24-an de februaro okazis la dua prelego el la serio *Forgesitaj samideanoj*, dediĉita al *Ilija Puhalo – la ĉefa figuro de la Internacia Asocio de la Fervojistaj Esperantistoj (IAFE)*. Prelegis **Josip Pleadin** kaj partoprenis dudeko da (ĉefe zagrebaj) geesperantistoj.



Donaco de la bulgara ambasado

La bulgara ambasado en Zagrebo estas unu el malmultaj diplomaciaj reprezentantoj, kiuj reagis al la invito donaci ABC-librojn por la migranta ekspozicio *Mia unua alfabetlibro*. Komence de marto venis granda pakajo, sendita de la Ambasado de Respubliko Bulgario, en kiu troviĝis 51 libroj uzataj en la unuaj klasoj de la bulgaraj lernejoj. Inter tiuj libroj estis eĉ deko da diversaj ABC-libroj, kaj la donaco de la bulgara ambasado estas la plej granda unuopa kontribuo por la menciita ekspozicio.

Krom la bulgara ambasado, por la ekspozicio kontribuis nur la Aŭstria ambasado kaj la Itala kultura instituo en Zagrebo, kvankam nia peto estis sendita al pli ol sesdek diplomaciaj reprezentantoj en Kroatio.

Koran dankon al la kontribuintoj!

ABC-libroj plus ekspoziciataj

Inter la 9-a de marto kaj 9-a de aprilo 2018 la ekspozicio *Mia unua alfabetlibro* gastos en la Junulara fako de la Urba biblioteko kaj legejo *Metel Ožegović* en Varaždín. Starigon de la ekspozicio en Varaždín incitis **Srećko Radulović**, kaj la ekspozicion realigis bibliotekisto **Tomislav Košić**, helpe de Esperanto-societo Varaždín.

La ekspozicio laŭplane poste migros al Muzeo *Croata insulanus* en Prelog, kie ĝi estos vizitebla inter la 26-a de aprilo kaj 17-a de majo. La organizajn laborojn en Prelog faras la muzea respondeculino, s-ino **Iva Kožnjak**.

Se ankaŭ vi, karaj samideanoj, deziras prezenti la ekspozicion en aliaj urboj de Kroatio, bonvolu informi pri la kondiĉoj ĉe: **dec.kroatio@gmail.com**

Kalocsay sur hungaria poŝtmarko

Antaŭ kelkaj tagoj, la 27-an de februaro, estis la 42-a datreveno de la morto de Kálmán Kalocsay, unu el la plej elstaraj verkistoj de Esperanta literaturo kaj lingvistiko. Malmulte konatas, ke danke al la investo de s-ino Ada Csiszár, lige al la 30-a mortodatreveno de Kalocsay, estis eldonita speciala poŝtmarko en Hungario kun 50-forinta nominala valoro, surhavanta la portreton de Kalocsay. La marko estas vera raraĵo, ĉar estis produktitaj nur kelkaj dekoj da ekzempleroj. (László Szilvási)



Portreto de Kálmán Kalocsay ligita kun hungara poŝtmarko, kies desegnaĵo estas zodiaka signo "fiŝoj".
Konstelacio en februaro.

*
Pretigita okaze de lia 30-jara morto-datreveno: 27.02.1976.

Anonco

La tria prelego el la serio *Forgesitaj samideanoj*, titolita **IVAN MATAŠIN** aŭ **JOHN MATASIN**, kroata elmigrinto en Sidnejo, okazos la **31-an de marto 2018** je la **11h00** en la societejo de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj en Zagrebo, **Radnički dol 1**. Bonvenas ĉiuj!

Francio: Poŝtkartoj petataj

Karaj samideanoj,

Mi nomiĝas Dominique Baron kaj loĝas en Tours, Francio. Mi instruas Esperanton en la kolegio, ene de la *Instituto Notre-Dame La Riche* al kvar junaj knaboj. Tri el ili havas 11 jarojn kaj unu havas 13 jarojn. Ili estas komencantoj. Por ke ili sciu, ke Esperanto estas vere internacia, mi petas vin, ke vi sendu al ili poŝtkarton de via lando. Tiamaniere ankaŭ la tuta Instituto scios pri Esperanto. Alkroĉite, mi sendas al vi foton de la grupeto.

Institution Notre Dame La Riche
à l'attention de Dominique BARON
30 rue Delpérier
B.P. 5813
FR-37058 Tours Cedex 1
Francio



Viaj opinioj

José Antonio Vergara (Ĉilio): Mi tre ĝuas la legadon de *Kresko*.

Anneke Schouten-Buys (Nederlando): Interesa legaĵo. Mi sendis ĝin al kelkaj geamikoj, indikante ke ili povos peti vin pri daŭra ricevado.

László Szilvási (Hungario): Denove grandan gratulon al vi pro la revuo! Mi admiras vian energion kaj iom envias la bjelovaran movadon! En la nuna numero du artikoloj aparte kaptis mian atenton. La unua estis tiu pri la ponto ĉe Peljeŝac (raraĵo inter Esperant-lingvaj artikoloj entute), kaj la dua pri *Multlingva Akcelilo*. Mi volis (kaj -as) atentigi pri ili en hungaraj ret-listoj kun mencio de reta adreso por legi ilin, sed bedaŭrinde mi ne trovis la pdf-dosieron de la revuo en la kutima loko ĉe *www.esperanto-bjelovar.hr*. Eble estus utile aldoni tie la dosieron antaŭ la rekta dissendado, ja tiel oni povus tuj plusendi iom da reklamo pri ĝi.

Júlia Sigmond (Rumanio/Italio): Tutkoran gratulon! Tiu *Kresko* konstante „kreskas“! Kresku ĝi ĝis la ĉielo!

Puramo Chong (Koreio): Mi legis vian gazeton *Kresko* pere de mia amiko en Usono, kiu plusendis ĝin al mi. Ĝi estas enhavriĉa kaj utila por informiĝi pri la movado ne nur en Kroatio, sed ankaŭ en diversaj mondopartoj.

Bo Sandelin (Svedio): Vidinte kaj leginte du numerojn de *Kresko*, mi trovis ĝin kaj enhance kaj lingve altkvalita kaj mi volonte estus sur via dissendolisto.

Masako Tahira (Japanio): Mi dankas vin pro la ĝisnuna alsendo de la tri numeroj de *Kresko*! En mia urbo Kioto ekzistas Kioto-Zagreba Amikeca Asocio. Mi estas ĝia membro.

Adam Wilkus (Pollando): Tre interesa numero! Ekinteresiĝis min precipe la teksto pri Esperanta ĵurnalismo kaj gazeteldonado.

Carmel Mallia (Malto): Koregan dankon pro la ricevo de *Kresko*, plena de beletraĵoj, priesperantaĵoj, historio. Belaspekta, riĉenhava kaj informa. Tamen la plej interesa parto por mi estas tiu, titolita *Rozoj kaj urtikoj*, ĉar ĝi esta speciala rubriko, akceptebla aŭ ne laŭ onies vidpunkto. Mi estu sincera: mi neniam legis tian rubrikon en revuoj. Ĝi povas plaĉi aŭ malplaĉi. Antaŭen. Ne senkuraĝiĝu.

Nevenka Frank-Gustin (Karlovac): Dankon pro la sendo de *Kresko*. Multajn jarojn mi ne legis Esperantajn vortojn.

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio): Dankegon por la nova *Kresko*. Estas vere ĝuinda legaĵo!

Lidia Ligeza kaj Grażyna Porada (Pollando): Ni elkore dankas pro la tria laŭvica *Kresko*. Ni gratulas pro via valora laboro.

Vinko Ošlak (Aŭstrio): Koran dankon por la 3-a n-ro de *Kresko*, kiu verdire kreskas. Mi antaŭĝojas jam la sekvan etapon, kian ni povas metafore dedukti el la viva parto de la mondo, ke la atingitan plenkreskon sekvas fekundeco kun fruktoj...

Ronald Glossop (Usono): Dankon pro via sendado de *Kresko*. Mi tre ĝuis ĝin.



Niajn **ROZOJN** ricevas tri francinoj: **Françoise Noireau** el Querrien, **Marion Quenut** el Toulouse kaj **Sarah Chedifer** el Saint Sauveur, kiuj havigis kaj sendis al ni ABC-librojn de la franca, okcitana kaj bretona lingvoj por la migranta ekspozicio *Mia unua alfabetlibro*.

KRESKO monata informilo

Eldonas:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE),
Jarunska 6, 10000 Zagreb

Retadreso de la redakcio:

zagreba.esperantisto@gmail.com

Redaktas: Josip Pleadin

Kresko aperas en la lasta tagdeko de ĉiu monato.

***Kresko* estas libere distribuebla,
kopiesbla kaj citebla.**